

Diru tridek tri

[el la Itala Esperanto-Federacio revuo "L'esperanto"]

de Renato Corsetti

5) Traduttore - Traditore

Kiam oni devas traduki el la itala al Esperanto prezentigas multaj problemoj, kiuj venas el specifaj italaj kulturaĵoj ne konataj eksterlande.

Ni prenu unu el la plej facile troveblaj ekzemploj:

"Nella stazione dei carabinieri l'appuntato stava parlando con il maresciallo quando arrivò il portaborse dell'onorevole."

Antaŭ ol provi traduki ĝin ni devas iom pensi pri la afero, eĉ tre longe pensi pri la afero..

Nia konata Elio Migliorini jam atentigis en sia lernolibro (mi citas el la 12-a leciono):

"106. Una lingua come l'esperanto, destinata soprattutto a scopi pratici, creata in modo da riuscire accessibile anche a persone di cultura non elevata o di civiltà diverse dalla nostra, deve avere una struttura ed un lessico semplici."

Si pensi a quello che avviene quando ci capita di servirci dell'italiano con uno straniero che non lo conosca bene. Consciamente o inconsciamente noi evitiamo gli idiotismi: diciamo, così, restar senza denaro anziché restare al verde, andare in collera anziché uscire dai gangheri, entrare in prigione o essere incarcerato anziché andare a vedere il sole a scacchi, ecc.

Lo stesso dobbiamo fare in esperanto: esprimerci nel modo piu' semplice e chiaro possibile, che è quello più facilmente comprensibile per gli stranieri.

La chiarezza si raggiungerà, oltre che evitando gli idiotismi, adoperando tutto quello che è necessario per farsi capire (non dunque manĝos, bensì mi manĝos) e sopprimendo tutto quello che è superfluo (ŝi estas pli bela ol mi kredis, ella è piu' bella che non credessi; mi ne vidas ion, non vedo nulla)."

Armitaj per la pensoj de Elio Migliorini ni reiru al la traduka tasko.

"Stazione" estas la unua vorto. "Stacio" o "stacidomo" certe estus eraraj tradukoj. Se vi havas la vortaron de Carlo Minnaja kaj vi iras al la kapvorto "stazione" vi povas komenci kompreni, kiom da sencoj tiu vorto havas en la itala. Mi kredas, ke la esprimo pli facile komprenebla de korea esperantisto estas "policejo" aŭ eventuale "loka policejo", ĉar la "stazione" estas malgranda kazerno de "carabinieri".

Kio estas, cetere, "carabiniere" por germano? Certe ekzistas en Esperanto la vorto "karabenisto", sed ĝin, laŭ mi, oni uzu nur parolante kun italoj aŭ hispanoj. Certe en

pluraj landoj ekzistas malsamaj dividoj inter la policaj unuoj (federacia kaj ŝtata en Usono), kiujn oni ne retrovas en aliaj landoj. Mi opinias ke ankaŭ por traduki "carabieniere" oni uzu la ĝenerale komprenatan vorton "polico". En teĥnikaj diskutoj oni povas klarigi la italan sistemon (se oni sukcesas), sed por eksterlandano "polico" estas pli tuj komprenebla.

"*Appuntato*" ne signifas "pintigita", sed, kiel la vortaro Minnaja bone klarigas: "kaporalo". Kaj "*maresciallo*" sugestas al franca esperantisto la ideon de "supera ĉefgeneralo". Ĉu vi memoras pri "*il maresciallo d'Italia Badoglio*"? Simile ekzistas "*il maresciallo di Francia*", "*il Feldmaresciallo*" en Germanujo, ktp.

Minnaja donas al ni la solvon por ĉi tiu "*maresciallo dei carabinieri*": "ĉefa suboficiro".

Por "*portaborse*" Minnaja proponas: dosierulo, sklava sekretario, helpolakeo. Ni rajtas elekti laŭ nia plaĉo kaj rezonado. En ĉi tiu okazo mi dirus: helpanto (se mi volus doni ne tre negativan impreson) aŭ helpolakeo (se mi volus doni negativan impreson).

"*Onorevole*" prezentas plian problemon. Minnaja proponas "deputito", kaj tio estas bona traduko. Mi mem dirus eĉ pli ĝenerale "parlamentano". Pensu pri la ebla frazo: "*L'ignobile onorevole non votò*" (= La abomeninda parlamentano ne voĉdonis).

Fine nia frazo iĝas: "En la loka policejo la kaporalo estis parolanta kun la (ĉefa) suboficiro, kiam alvenis la helpanto de la parlamentano."

Kiel vi vidas, por ne perfidi la originalon kaj doni al eksterlanda esperantisto la eblecon kiel eble pleje kompreni, oni devas multe rezoni.

Tiaj traduk-problemoj estas ekstremaj ĉe proverboj. "*Tanto va la gatta al lardo...*" estas tradukinda laŭ la Esperanta Proverbaro: Longe ŝtelas ŝtelisto, tamen fine li pendos.